Kiel preĝi dekumon de Rozario?

Faru **krucosignon** kaj eldiru, aŭ elpensu, la nomon de la mistero.
Meditu ĝin iomete en silento.

Poste:

Patro nia (1-foje)

Patro nia, kiu estas en la ĉielo,
sanktigata estu via nomo.
Venu via Regno.
Fariĝu via volo,
kiel en la ĉielo tiel ankaŭ sur la tero.
Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ
kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,
kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.
Kaj ne konduku nin en tenton,
sed liberigu nin de la malbono.
Amen.

Saluton Maria (10-foje)

Saluton, Maria, gracoplena,
la Sinjoro estas kun vi.
Benata vi estas inter la virinoj
kaj benata estas la frukto de via sino, Jesuo.
Sankta Maria, Dipatrino,
preĝu por ni pekuloj
nun kaj en la horo de nia morto.
Amen.

Gloro (1-foje)

Gloro al la Patro, kaj al la Filo, kaj al la Sankta Spirito,
kiel en la komenco, tiel nun kaj ĉiam, kaj en eterno. Amen.

www.breviero.org

Kunviva Rozario

de la Esperant(ist)oj

NI PREĜU EN KOMUNIO KUN GEFRATOJ EL LA TUTA MONDO !

Kio estas kunviva rozario?

Kunviva rozario estas preĝoĉeno de 20 personoj. Ĉiu el ili meditas ĉiutage, per dekumo de rozario, la misteron al li/ŝi konfidita, en komunio kun la 19 aliaj membroj. Tiel, kompleta rozario estas ĉiutage meditata kaj kunviva rozario konsistigas Eklezian preĝon.

La ideo tiel disdividi rozarion inter pluraj personoj naskiĝis en la deknaŭa jarcento en Lyon, sub impulso de juna virino Pauline-Marie Jaricot. En multaj landoj, paroĥoj organizas kunvivan rozarion inter siaj membroj. En Pollando sub nazia boto, ĝi estis popularigita de Jan Tyranowski, la unua majstro de forpasinta papo Johano-Paŭlo la IIa.

Kunviva rozario en lingvo Esperanto

Ĉiu kunviva rozario en Esperanto kunigas personojn el diversaj landoj kaj lingvoj. Kelkaj membroj renkontiĝas ofte, aliaj ne; sed ĉiuj konatiĝas kun la aliaj per leteroj, per interreto aŭ tra aliaj membroj. Aldone al meditado de la ricevita mistero kaj porpeto pri speciala preĝintenco, ĉiuj membroj disdividas inter si personajn intencojn.

Partoprenas personoj el ĉiuj vivo-statoj: pastroj aŭ laikoj, monaĥinoj aŭ geedzoj... Ne ĉiuj membroj parolas Esperanton, tamen ili lernis la preĝojn en tiu lingvo kaj spertas ke komuna

lingvo vivigas konkretan kaj fratecan komunion trans landlimoj.

Nuntempe funkcias tri kunvivaj rozarioj. La unua havas kiel patronon sanktan Maksimilianon Kolbe kaj specialan preĝintencon: “por la suferanta Eklezio: malsanuloj, persekutatoj pro la Fido, malriĉuloj”. La dua havas kiel patronon beatan Elizabeth de la Triunuo kaj specialan preĝintencon: “la unueco: unueco de la kristanoj, unueco de la familioj”. La tria havas kiel patronon beatan Tereza de Kalkuto kaj specialan prepreĝintencon: “por la paco, en la koroj, en la familioj, en la mondo; la paco inter homoj, inter homo kaj Dio, inter homo kaj naturo”.

Ĉu ankaŭ vi deziras partopreni?

Por fariĝi membro de la Kunviva Rozario de la Esperant(ist)oj, oni promesas:

- mediti ĉiutage la atribuitan misteron per dekumo de rozario en lingvo Esperanto;
- preĝi por kaj en komunio kun la aliaj membroj de sia kunviva rozario;
- preĝpeti la Sinjoron por la speciala preĝintenco de sia kunviva rozario.

Se vi pretas partopreni, skribu al la kunordigantoj: Anne & Bruno Masala, 18 rue Gambetta, F – 57000 METZ, Francio – ret. amb@breviero.org

Sendu kelklinian prezenton de vi (loĝloko, aĝo, stato de vivo, profesio) por nutri la fratan preĝon de la aliaj.

LA KUNVIVA ROZARIO, EKDE SIA NASKIĜO,
ESTAS PREĜO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ.

© Breviero.org 2005-2007

La 20 misteroj de la Rozario

Ĝojaj misteroj

- La **anonco** de la Anĝelo al la Virgulino Maria
- **Vizito** de Maria al Elizabeto
- La **naskiĝo** de la Infano Jesuo en Betlehemo
- La Infano Jesuo prezentita ĉe la Templo (**prezento**)
- Jesuo retrovita en la Templo meze de la instruistoj (**retrovo**)

Lumaj misteroj

- La **Bapto** de Nia Sinjoro Jesuo Kristo ĉe Jordano
- La **nupto en Kana**
- Jesuo anoncas la Regnon de Dio kaj invitas al konvertiĝo (**montprediko**)
- La **Transfiguriĝo** de Nia Sinjoro Jesuo Kristo sur Monto Tabor
- La starigo de la Eŭkaristio (**lasta vespermanĝo**)

Doloraj misteroj

- La preĝado kaj la **agonio** de Jesuo en la Olivarba ĝardeno
- La kruela **skurĝado** de Jesuo ĉe la kolono
- Jesuo kronita per tre pikantaj dornoj (**dornokrono**)
- Dolorplena vojaĝo de Jesuo al Kalvario (**krucoportado**)
- **Krucumo** kaj morto de Jesuo sur la kruco

Gloraj misteroj

- **Resurekto** de Nia Sinjoro Jesuo Kristo el la morto
- **Ĉieliro** de Nia Sinjoro Jesuo Kristo
- Descendo de la Sankta Spirito sur la Apostolojn kaj Marian en la Vespermanĝejo (**sendo de la Sankta Spirito**)
- **Ĉielenpreno** de la Virgulino Maria
- **Kronado** de la Beata Virgulino Maria Reĝino de la Ĉielo kaj de la Tero

www.breviero.org